

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 40 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

JANUARO - FEBRUARO

1979 - 1

KULTURAJ KAJEROJ

1979 JANUARO - FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon A. Mollison

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Trogloditoj en Loire-valo B. Cheverry

Psikologio kaj Esperanto Ĉ. Zaheb Zamani

Jules Verne

— **Iom pri la homo**

— **du eltiraĵoj de « Vojaĝo al la centro de la tero »**

M.E.M., 25 jara W. Gilbert

Fotografado, fotografaĵo, fotografio W. Grela

Kontribuanto al la esperanto kulturo G. Silfer
intervjuita de S. Bourot

Tri rumanaj poeziaĵoj Trad. T. Macovei

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.

El Grésillon

En numero 113 de « Esperanto en Skotlando » aperis artikolo de S-ro Alexander Mollison, kiu jam plurfoje vizitis Grésillon kun sia familio. Ni aperigas tiun artikolon kun konsento de la aŭtoro.

NOVAJ IMPRESOJ PRI GRESILLON.

Por tri semajnoj dum la pasinta somero mi kaj miaj familianoj (kvarope) revizitis Kastelon Grésillon, la Esperantista Kulturdomo en Francujo. Ĉi tiu estis la tria fojo kiam ni libertempis tie, kaj denove ni spertis la faman « etoson » de tiu vera Esperantujo. Pro tio, ke jam aperis artikolo de mi en 1973 pri Grésillon, mi ne deziras tedi niajn legantojn pri praktikaj detaloj. Sed eble mi povas interesi vin pri novaj impresoj miaj dum la pasinta vizito.

Antaŭe ni restis dum la t.n. internacia periodo. Ĉifoje ni fendis du periodojn; tiel ni ĉeestis dum du semajnoj kiam oni instruis Esperanton. Tiam mi ja rimarkis kiel bone organizita estas la kastelo pri edukado en la internacia lingvo. Notu ankaŭ ke mi skribis « en la internacia lingvo », ĉar ne nur la mezgradan kaj altgradan kursojn oni instruas tute en Esperanto, sed ankaŭ la elementan por komencantoj. Por tiu, oni uzas la Cseh * — metodon, tre sukcese laŭ mia edzino kaj infanoj, kiuj partoprenis. La nura problemo, kiun ili spertis, estis la ĉeesto de pluraj homoj, kiuj vere ne estas komencantoj. Ankaŭ en la altgrada kurso, kiun mi ĉeestis, la homa naturo al pedanteco evidentiĝis ; tamen tio estigis multe da disputoj efikaj en la klerigo de progresintoj.

Kiel kun la prelegoj dum la internacia periodo, la kursoj daŭras nur dum la matenoj. Kaj kiel ĉio en Grésillon, ili ne estas devigaj.

Mi jam rimarkigis, ke la kastelon ĉiam plibonigas la reganta instanco, kiu konsistas tute el volontuloj, kiuj pene laboras en tiu plibonigado, krom la administrado mem. Ni konstatis denove la evidentan elspezadon, kiu inkluzivis la dekoracion de nia ĉambro (sama kiel en la pasinta vizito) kune kun instalo de du modernaj pelvoj kaj bideo. Ĉiu ĉambro en la kastelo nun disponas kaj varman kaj malvarman akvon, kvankam la aldonaj ĉambroj ankoraŭ ne disponas.

La instanco ankaŭ sukcesis aĉeti kroman areon da parko, tute kovrita de arboj kaj arbustoj. Estas ja plezure promeni tra tiu arbarejo pere de aleoj, ŝirmitaj, agrablaj, malvarmetaj, kun la tremaj radioj de la suno intermite kaj ĝoje frapantaj la vojeton antaŭ la piediranto.

Kio pri la manĝoj ? Dum periodo de senĉesa inflacio, konstatinte ke la prezoj ankoraŭ estas mirinde modestaj, ĉu mi ne motis malboniĝon de la manĝaĵoj ? Tute ne ! La francoj, kiel la aliaj kontinentuloj, frandas la manĝojn kaj ni denove spertis la lertecon de la francaj kuiristoj. Ĉifoje, tamen, ni kunportis kun ni iom da « britaj » manĝaĵoj por la matenmanĝoj, ĉar tedas ĉiutage manĝi panon, buteron kaj konfitaĵon por tiu manĝo.

Ĉiam variaj, la manĝoj eĉ gajnis iun tagon helpe de japanino, kiu provizis spicojn por la nudeloj, kiuj akompanis rulvolvitajn bovaĵojn.

Televizio, feliĉe, mankas en la kastelo kaj la staĝanoj (kiel nomiĝas la ĉeestantoj) distras sin vespere per muziko, kantado, rakontoj, anekdotoj, dancado, prezentado de filmoj kaj diapozitivoj kaj similaj laŭvole. Ĉiam troviĝas almenaŭ unu homo, kiu pretas prezidi la distriĝ-vesperojn, kaj iu humurulo ja estas S-ro Odd Tangerud el Norvegujo. Li trafe instruis popoldancojn de diversaj landoj kaj rakontis fabelojn de sia propra lando. Li men diras, ke lia nomo, estas trafa — por la anglaparolantoj !

En la ĉirkaŭaĵo de Grésillon ni ankaŭ rimarkis signojn de pligrandiĝanta riĉeco pro novaj konstruaĵoj kaj pli bona konservado de la ŝoseoj.

Estas multo, pri kio mi povas skribi, sed spaco mankas ; do mi resumu mallonge la ĉefajn aferojn, kiuj min trafis :

— la vetero en Francujo ŝanĝiĝas same kiel en Britujo — eĉ pli !
— la ĉeesto de diversaj landanoj, ekz. iranino, en Grésillon ;
— la plezuro entrepreni Origami (desegno per paperpecoj) pere de ĉarma japanino ;
— la ĝoja konstato, ke Esperanto ankoraŭ allogas junulojn ;
— la nesubtakseblaj streboj de la fondintoj de Kastelo Grésillon dum la 50-aj jaroj ;
— la gravaj avantaĝoj de Grésillon laŭ vidpunktoj kultura, amikeca kaj distra.

Aleksandro MOLLISON.

Esperanto tra la Mondo

La U.E.A.-kongreso en Lucerno

— La protektanto de la kongreso estos D-ro Hans Hürlimann, federacia prezidanto de Svislando. D-ro Hans-Rudolf Meyer, parlamentano kaj urbestro de Lucerno, prezidos la honoran komitaton.

— La ĉeftemo de la kongreso estos : « la lingva aspekto de internacia organiziĝo ». Krome, la komitato denove pritraktos la gravan demandon pri statutaj ŝanĝoj, pri kiuj malsamaj opinioj jam esprimiĝis.

— Dum la kongreso, la svisa radio elsendos ĉiutage en Esperanto.

— La 47a internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazos samsemajne kaj samloke kiel la universala kongreso.

La S.A.T.-kongreso en Svanvik

— La O.K.K. atentas pri la jam ricevitaj petoj por packunveno, Tanef kaj Liberecana.

— Dua oktaga postkongresa ekskurso estas nun planita al Chester. Por tiu ekskurso, sin turni al K-dino Ruth Roberts, 54 Village Road, Gosport, Hants PO122LG (Britio).

Ankoraŭ aliaj renkontoj en 1979

— Internacia ferio-semajno, 14a-21a de Julio, sur strando proksime de Sicilio. Adreso : Domenico Fiume, Via San Francesco 86-D, I-89051 Archi (Reggio-Calabria).

— Renkonto de Esperanto-familioj (seminario kaj speciala programo por infanoj), en Hodmezövasarhely (Hungario), 8an-14an de Julio. Skribi al E. Cziszar, Kulich Gy.u. 25 V. 16, H-8100 Varpalotta.

— Fervojista rendevuo en Francio, 23an-30an de Septembro, en Loctudy, apud Quimper. Kultura semajno kaj jara kunveno. Informas P. Robiolle, 59, rue Gardé-nat-Lospotol, 92150 Suresnes.

Asocio pri esperanto-studoj en Usono

La 28an de Decembro, okazis, dum la jarkonferenco de la Asocio por modernaj lingvoj en Novjorko, la unua kunveno de novfondita Amerika Asocio pri esperanto-studoj (Esperanto Studies Association of America). Aliĝis pli ol 50 anoj, precipe universitataj profesoroj kiuj okupiĝas pri la instruado aŭ studado de aspektoj de Esperanto.

Prof. H. Tonkin estas prezidanto de la asocio. E.S.A.A. planas ampleksan programon por la venonta jarkonferenco de A.M.L. en San Francisco.

En la universitato de Aix-en-Provence

En tiu universitato, la esperanto-instruado konsistas el du studjaroj (unu horo kaj duono ĉiusemajne). La unua jaro estas por ellernado de la bazaj scioj ; la dua estas dediĉata al enkonduko al la literaturo. Ĝis nun, la kurson sekvis ĉiujare inter 15 kaj 30 gestudentoj. La profesoro estas S-ro Michel Duc Goninaz, kiu ankaŭ instruas la rusan lingvon.

Favoraj deklaroj de la hungara instru-ministro

La hungara ministro pri edukado, S-ro Karoly Polinszky, emfasis, en intervjuo, ke Esperanto povus esti la plej demokrata ilo de internacia komunikado. Li subtenis la ideon de 140 hungaraj parlamentanoj kiuj proponas ke parlamenta komisiono esploru la lingvan problemon en la internaciaj rilatoj. Nun, Esperanto estas instruebla en la hungaraj gimnazioj.

Turisma kalendaro 1979

La esperanta organizo « Monda Turismo » kaj la turisma servo de Tejo publikigis la turisman kalendaron 1979 sub formo de broŝuro eldonita en Pollando. En tiu lando, interalie, multaj manifestacioj estas antaŭviditaj laŭlonge de la jaro 1979. Petu informojn al : Buroo de Internacia Esperanto-Interŝanĝoj, str. M. Sklodwskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz, Pollando.

Novaj libroj

— « La perdita honoro de iu Katarino Blum ». Traduko de la romano de Heinrich Böll, la germana nobelpremiita verkisto.

— « Lingvistikaj aspektoj de Esperanto », de John Wells.

— « Ĉu li bremsis sufiĉe ? » nova krimromano de Johan Valano, la aŭtoro de « Ĉu vi kuiras ĉine ? ».

— « Facetoj de Esperanto », libreto (51 paĝoj) de nia konata verkisto W. Auld.

— « Skota antologio » (256 paĝoj).

— « Trezorinsulo ». Traduko de la fama rakonto de R.L. Stevenson.

— En la sama libro, reeldono de du originalaj rakontoj de F. V. Dorno : « La aventuroj de L.R.M. Stultulof la Xa » kaj « Levu la manojn ! ». Facilaj legaĵoj.

— « La sesdekoka — ĉu decida jaro ? ». 27 paĝa kajero politika de G. Silfer.

— « Koncize pri M.E.M. » eldonita de Monpaca Esperantista Movado okaze de sia 8a ĝenerala konferenco en Varna. La broŝuro, 26-paĝa, enhavas jenajn artikolojn : « sur la vojo al naskiĝo de MEM » (W. Gilbert), « Misio kaj celoj » (N. Aleksiev), « Historia skizo » (O. Knichal), « Strukturo de MEM », « Aktiva parto de la monda pacmovado » (S. Podkaminer), « Ĝeneralaj konferencoj de MEM ».

Esperanto en franclingva spiona romano

Aperis en Francujo, en konata serio de spionaj romanoj, romano de P. Nemours titolita : « Le général et l'Anti-Babel », kiu disvolviĝas okaze de... esperanto-kongreso en Varna. Fantazia rakonto kun, kompreneble, belaj heroinoj !

Tendumado por gejunuloj

Internacia tendumado estos organizita por junaj esperantistoj, de la 1a ĝis la 8a de Julio, en Hertgenwald, ĉe Eupen (Belgio). Informas N.E.J., F. Stein, Raadhuisstr. 18, Geleen (Nederlando).

Simpozio por edukistoj

En universitato René-Descartes de Parizo, okazos de la 17a ĝis la 19a de Majo, simpozio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj : « Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia eŭropa lingvo ».

Ekologia bulteno

Ekologia Rondo Esperantista publikigas nun bultenon : « Ekoperanto ». Adreso : S-ro B. de Wit, Leidsevaart 52, 3114 AD Vogelenzand, Nederlando.

Esperantista romano tradukita en la anglan

La fama esperantlingva romano de Varankin « Metropoliteno » aperos baldaŭ en la angla traduko de Martha Evans, kun ampleksa postparolo (pri esperanto) de William Auld.

Trogloditoj en Loire-valo

Unue, kio estas trogloditoj ? Serĉante en P.I.V., oni legas : Troglodito, homo konstante loĝanta en kaverno (uzata speciale pri la prahomoj).

Kial, do, reiri al tia antikva periodo ? Kial limiĝi al nura land-parto ?

Ĉiuj bone scias, ke tutmonde ĉie, kie la grundo tion permesis, homoj uzis tiajn kavaĵojn je plej diversaj uzoj : hejmoj, temploj, malliberejoj, entombejoj, ktp.

Sed, multaj el vi, karaj vizitantoj de Gresillon, ankaŭ scias ke ne malproksime de nia Esperantista Kulturdomo, en valoj de Loire kaj ties alfluoj, ankoraŭ nun familoj vivas troglodite, kvankam komforte, dank'al elektra internaj modernigadoj. Tio, je la miro de turistoj surprizataj de la stranga allogeco de kelkaj el tiuj kelaj loĝejoj, kies kamenoj elsprucas el herbejaj aŭ ĝardenaj tegmentoj, kies pordoj kaj fenestroj, en la roka fasado, estas ornamitaj de plantoj kaj riĉkoloraj floroj. Se tiaj enloĝataj lokoj ne estas larĝe malfermitaj al nekonataj promenantoj, tamen, havas multon por esplori.



Ja, oni ne povas silenti pri la agado de arkeologoj kaj aliaj specialistoj ankaŭ de bonvolemuloj, kiuj nepre deziras konservi al postvenontoj konkretajn postsignojn de plej malnovaj civilizadoj kaj sukcesas levi al siaj aspiroj multe da gejunuloj, skoltoj, studentoj, laboristoj, kiuj ĝojeme donas liberajn horojn al tiaj serĉadoj, renovigadoj, prezentoj kiam, en « keloj enloĝataj » (laŭ la franc-regiona esprimo « caves demeurantes ») oni kreis muzeon. Kaj ne kredu, ke senescepte temas pri pitoreskaj praavaj loĝlokoj. Ne. Estis epokoj, multe pli proksimaj al ni, kiam pro diversaj kialoj, ne nur simplaj kamparanoj sed ankaŭ nobel-sinjoroj, riĉaj bien-posedantoj, religiaj establoj elektis tiajn dom-kelojn. Povas mirigi nin la interna vido de tiaj grotoj kun altaj belegaj kamenoj kaj diversaj dekoracioj arte skulptitaj en la roko mem, dum la Renesanca periodo, je la 15-a jarcento, eĉ en la 18-a, kiel en samaĝaj kasteloj.

Sed, antaŭ priskribi loĝ-lokojn jam arte ellaboritaj, ni revenu al tempoj multe pli foraj kaj jen unua demando : Kio incitis prahomoj elekti tiajn rifuĝejojn ? Ĉu nura mura instinkto ? Povas esti. Ĉu ni mem, homoj de la 20-a jarcento, en okazo de pluvego aŭ fulmotondro sur kamparo... aŭ pro timo de homaj armiloj, ne kurus, se estus en la proksimeco, al protektanta enroka krutaĵo ?

Verŝajne, niaj praavoj same faris, kaj, pli malpli rapide, iris de la natura ne ĉiam perfekta rifuĝejo al pligrandiĝo de en- aŭ sub-roka ŝirmejo antaŭ ol krei mem kelajn domojn kiam ili trovis terenojn samtempe fortikajn kaj facile tranĉeblajn, ankaŭ la necesajn ilojn, unue la tranĉilojn el siliko, en la neolotika periodo.

Ĉe ni, en orienta parto de Anĵu, ĉe rando de kio oni nomis « Pariza Baseno » (antaŭa prahistoria maro) larĝa kreta zono superas per siaj altaĵoj la madekstran bordon de Loire kaj ties alfluoj. En tiu sufiĉe mola krutaĵo la homoj, tre frue, sciis bori domojn en plej konvenaj lokoj : konstanta spertado enkondukis ilin en serĉadon de plej taŭgaj geologiaj tavoloj, ne nur facile tranĉeblaj sed kies rezistadon al defalado ili tre rapide scipovis kalkuli.

La plej modestaj estis kreitaj de la loĝanto mem sen helpo de masonisto. Li mem traboris tra la kalka ŝtono (la regiona « tufo ») pordon kaj fenestrojn, kaj ni povas fidi je lia trovemo por solvi iaman loĝado-krizon kiam infanoj iĝis tro multnombraj : al li sufiĉis bori plian, flankan ĉambron !

Laŭpove, troglodito, ĉiam elektis plej bonan orientiĝon kaj malfermis la kavaĵon frunte al la suno. Ĉiumaniere, tiaj domoj estis multe pli komfortaj, ol oni povas supozi, kompare kun samaĝaj kamparaj domaĉoj. Tute ŝirmitaj de vento, je konstanta temperaturo, ne tro malvarma vintre, ne tro varma somere, ili, plue, posedis interne kaj ekstere ĉion necesan al familia, eĉ profesia vivo de la loĝantoj.

Borde de riveroj, kie la konstruanto havis je sia dispono altan monteton permesante krei pli lumigatan etaĝdomon, la necesaj internaj ŝtuparoj fakte konsistis el suprenirantaj tuneloj boritaj en la roko mem, kun kruta deklivo preskaŭ vertikala sufiĉe larĝaj kaj altaj por unu persono, ne pli, kaj entajlitaj de ŝtupoj pli malpli larĝaj kaj altaj. Tiuj ŝtuparoj kondukas ne nur de malsupraj al supraj ĉambroj sed povas pluiri el la tegmenta ĝardeno kaj tiel permesi rektan legom-provizadon : Oportune, ĉu ne, kiam pluvas aŭ precipe frostas, kiam la eksteraj krutaj vojetoj estas glitaj ! Sed, okazis, ke trogloditaj kolonioj, aliloke submetitaj al plej urĝaj bezonoj ĉe malsamaj topografiaj lokoj, ekzemple je la 5-a jarcento, okaze de barbaraj invadoj, devis plej rapide trabori protektantajn subterajn domojn. Tiaokaze, la loĝejo ne plu konsistas el pluretaĝaj ĉambroj en rok-flanko sed etendiĝas, samnivele, subtere. Surtera, enkavigita vojeto iras de unu kelo al aliaj grupitaj en vilaĝetoj, ofte en formo de duoncirklo. En sama regiono, tiaj domoj, ankoraŭ videblaj kaj ofte enloĝataj, estas duon-subteraj kaj ricevis, verŝajne pli poste, fasadon el tajlitaj ŝtonoj kaj antaŭ-tegmenton por protekti la enirejon kiu malfermiĝas ĉe korto samnivele duon-borita en la grundo.

Aliaj, esence subteraj, kun malfermoj put-formaj, delonge, ne plu estas uzataj kiel loĝejoj. Cetere, eĉ de origine, tiuj-ĉi, plej ĝenerale, estis minejoj el kiuj oni eltiris el la faluna benko, la belajn blankajn ŝtonojn por konstrui katedralojn, preĝejojn, kastelojn, eĉ pli simplajn domojn en la ĉirkaŭaĵoj. Ekstrakton de tiuj ŝtonoj plej ofte oni efektivigis el fermitaj minoj kun sola mallarĝa eniro. Dumtage, la ministoj laboris funde de galerioj ĉiutage pli profundaj, kaj vespere ili retrovis la familion en kavaĵo speciale borita por ĝi ĉe la enirejo de la laborloko. Sed, dumvintre, masonistoj venintaj el malproksimaj regionoj, eĉ landoj, trovis loĝejojn en la minejo mem. Pli poste, tiuj kreitaj kelegoj ricevis praktikajn uzojn kunligitajn kun la loka agrikulturo. Plej ofte ili iĝis ŝirmejoj por la vinoj rikoltitaj el la supraj vitoj aŭ por ilia transformado en « mousseux », simila al Ĉampan-vino. Ankaŭ por industria kulturado de fungetoj. Multnombraj, ege profundaj estas tiaj keloj en nia regiono.

Ni revenu al troglodita loĝejo kaj eniru. Ĝenerale, baro-krado el ligno, pli poste el metalo, defendis la enirejon kontraŭ noktaj, maloportunaj aŭ danĝeraj vizitoj. La pordo mem, el ligno, konsistas el du partoj : Tiel, laŭ la sezono aŭ vetero,oni povis malfermi la supran kiel fenestron kaj lasi fermita la suban kiel protektilon kontraŭ malvarmo, vento, eniro de kortaj bestoj... aŭ de fremduloj. La fenestroj, je formo de pli malpli grandaj rektanguloj estas tre larĝigitaj ĉe la interno por enirigi la maksimumon da ekstera lumo. La lignaj ŝutroj estas internaj. La kela planko plej ofte konsistas el la zorge niveligita roko. Kelkfoje, oni kovris ĝin de pavimeroj el kuirita argilo pli dekoraciaj. Ankaŭ la vandoj plej ĝenerale restas nature rokaj kun videblaj markoj de la pik-pioĉo, sed okazas ke oni surkovru ilin de kalko-lakto aŭ de mortezo por ebenigi ilin. La volboj, ĉiam simplaj ĉe kamparanoj povis ĉe nobeloj aŭ riĉuloj, ricevi pli artajn formojn de trapezo, arko, korbo-anso aŭ kupolo laŭ momenta regiona modo... ankaŭ laŭ la kvalito de la roko.

Kelkfoje ĝis 6-metrojn altajn, oni devis subteni ilin per ŝtonaj pilieroj. Okazis, ke por plia komforto, la troglodito instalis plafonon, kiu malpermesas la disfalon de rokpolvaĵoj, vintre malvastigas la hejtatan kub-mezuron kaj donas malaltan subtegmentejon por legom-provizadoj.

La imag-povo de niaj praavoj ankaŭ estis granda por formi el, kaj en la roko mem la necesajn aŭ dekoraciajn utilaĵojn. Ĉefa bezono en iu ajn domo : la fajrejo por varmigi, kuiri, gajigi. En troglodita ĉambro, ĉiam la kameno estas tre proksima al la fasado, la sola ĉambro-parto kiu ricevas la maksimumon da lumo. La interna tubo povas estis de 3 ĝis 10 metroj longa, laŭ la supera dikeco de la roko. Ekstere, tiu kamen-tubo superstaras la grundon per pliaj 2 metroj. En tiaj domoj neniu incendirisko ! Eĉ la senfulgiĝo ne levas problemon. Sufiĉas Infera fajro el pajlo, kies flamoj povas sendanĝere eliri la tegmentan grundon, kondiĉe ke oni elektu oportunan sezonon. Interne, kiel en ĉiuj antikvaj kamparaj domoj, la kameno prezentas grandajn dimensiojn. Ĝi reprezentas la koron mem de domo pro ĝia utileco, ankaŭ pro ĝia altiro al familia rondo, ĉefe dum malbelaj sezonoj. Plej ofte, ĝi estas la ĉefa ornamaĵo de la komuna ĉambro, tiel pro ĝiaj dimensioj, kiel pro ĝia arta formo kaj la skulptajoj kiujn oni aldonis al ĝi. Ĉe ambaŭ flankoj de la fajrejo estas niĉoj kun benkoj tajlitaj en la roko : Plej ŝatataj lokoj dum la vintra sezono por, tute ŝirmitaj de la vento-blovoj, varmigi sin, ludi per la braĝoj, babiladi, eventuale dormeti. Interne de la kameno, aliaj kavaĵoj, malgrandaj kaj diversformaj, permesas konservi sekaj la familian salujon, la kanabajn fadenojn, la alumetojn. Unu aŭ pluraj truoj permesas enirigi, horizontale, la pintajn tigojn de kandel-portiloj.

Plej praktike estis aranĝita en apuda kavaĵo granda lesiv-kuvo el kuirita argilo, kiu laŭbezone, kunligita al bolanta marmit-akvo konsistigis inĝenian tuk-lavujon. Alia nepra akcesoro de la kameno estis la bakujo por kuiri la familian panon. La ĉi-cela kavaĵo, malfermita en la roko estis kupolforma. Ĝia planko konsistas el kaheloj el kuirita argilo pli facile purigeblaj ol la roko. Kelkfoje, la Anĵua kameno entenas duan pli malgrandan fornon por sekigi la nigrajn prunojn uzotajn dumvintre. Plue, forno kun bruliloj provizataj de lignaj braĝoj ankaŭ trovas lokon en alia kavaĵo sub la granda kamen-fronto.

Sed, ne nur interne de la kameno estas niĉoj ! Kiam oni vizitas malnovan trogloditan loĝejon ĉiam surprizas nin la multnombreco de la kavaĵoj enboritaj je diversaj altecoj, laŭlonge de la flankaĵoj. Tiel, senpage, senembarase, la loĝantoj havis je sia dispono tre praktikajn ŝrankojn. En tiuj kavaĵoj, enrokaj foldoj permesas enŝovi tabuletojn por formi bretojn kaj apartaĵojn ankaŭ glit-pordojn. Aliparte, ĉe la plafono kiel en la roka planko, multeco da truoj permesis pinte enfiksi lignajn palisetojn, najlojn aŭ kroĉilojn por pendigi ilojn, korbojn, manĝaĵojn.

Ankaŭ por la litoj, oni kreis enrokajn alkovojn eventuale kaŝeblaj de kurtenoj. La puto, laŭeble interne de la kelo povis havi diversajn uzojn krom la necesa akvo-provizado. Malsimetriaj anfraktoj, laŭlonge de ĝia interna tubo formis ŝtupojn por loki la piedojn kaj tiel permesi malsupreniron ĝis la akvo-nivelo, ĉu por purigi la puton, serĉi falintajn objektojn... ĉu por iri al sekreta kavaĵo, vera trezor-kaŝejo por la loĝantoj ! Ankaŭ povis esti homkaŝejo en la interna puto-flanko, aŭ eliron de subtera tunelo al ĉirkaŭantaj kampoj aŭ arbaroj : tunelo tre utila en okazo de grava danĝero !

Sagace trovemaj por ilia propra komforto niaj praavoj same agis por lokigi farmobestojn kaj ilojn, kolombojn kaj abelojn, rikoltojn, ktp. Novaj kamentuboj povis ĉu rekten provizi la bestojn el la supraj kampoj, ĉu rekten, el vitejoj, konduki la vinberojn en la enkelan premilon. Kaj plej ofte tuneloj kunligis la hom- al bestloĝejoj.

El tio, ni povas kredi, ke neniuokaze, je sama epoko, la troglodita vivo en Loire-valo povis esti pli malagrabla, ol en tiamaj subĉielaj domoj. Kontraŭe. El rakontoj de propraj geavoj miaj, ŝajnas, ke en la pasinteco, tiuj trogloditoj ofte posedantoj de siaj kavaĵoj, eĉ kiam ege malriĉaj, esti malpli ligitaj al bien-posedantoj, ol farmistoj sur ebenaĵoj, kaj pro tio dumlonge konservis malsimilajn penskaj viv-manierojn.

B. CHEVERRY.

PSIKOLOGIO KAJ ESPERANTO

Laŭ prelego prezentita en Grezijono dum Julio 1978

La unua demando tiu-rilate estas : ĉu Esperanto havas pozitivan influon aŭ efikon sur la personeco de ĝiaj parolantoj, speciale sur la infanoj, kiuj denaske lernas ĝin ? La respondo, laŭ psika vidpunkto, estas definitive « jes ». Kial ?

Rilate Esperanton kaj psikologion, oni malkovras ion grandiozan pri psikofiziko, pri kiu, ĝis nun, nek psikologoj nek fizikistoj trovis ian kontentigan respondon.

Kiam oni parolas, aŭ pli bone, kiam oni diras siajn pensojn per vortoj, oni transformas ian psikan kaj neparolan energion al ia parola aŭ buŝa energio. Tiu-ĉi konstanta transformado de energio estas la komuna temo inter psikologio, fiziko kaj lingvistiko.

Nu, oni pensu kiom da funkcioj aŭ ŝlosiloj bezonas la cerbo por elfari tiun transformon. Do, tiam, oni tuŝas la interrilaton de la menskapableco kaj la nombro de la gramatikaj reguloj de la lingvoj.

En ĉiuj tiel-nomitaj ne-artefaritaj lingvoj, ĉiuj reguloj estas funkcibutonoj de tiu transformiga aparato de la cerbo : Transformi ne-parolan energion al verba energio. Kaj, ĉi-tie, venas la grava demando : la regulojn de kies lingvoj oni povas modeligi kiel la plej bonaj por tiu komputilo, la homa cerbo ? Ĉu tiujn de la sanskrita kiuj estas 4000, ĉu ties de multaj aliaj, kiuj, pli malpli estas 2500 ?

Esperanto, efektive, donas al ni la modelon aŭ la matricon de la minuma nombro de la respektivaj butonoj por tiu-ĉi transformado. Laŭ Esperanto-fundamento, homa menso bezonas nur 16 principajn kaj 100 ne-principajn regulojn aŭ komeno-butonojn por fari tiun transformadon.

Tiu-ĉi malkovro estas unu el la plej gravaj en la historio de la scienco, kies multnombraj dimensioj restas ankoraŭ ne pristuditaj. Kaj ĝuste de ĉi-tie komenciĝas la rilato de Esperanto-komputiloj kaj la teknologio de la traduk-maŝinoj. Oni ja povas trovi multon ĉi-rilate en « Computer Weekly », kaj en la esploroj de Prof. Bruce, usona samideano de la universitato de Illinois. Do, se vi jam aŭdis, aŭ aŭdos, ke Esperanto estas la plej amata lingvo de la komputiloj, vi ne tro miru !

Alia interrilato de psikologio kaj Esperanto estas la « korektada periodo » en infanaĝoj. Ĉiuj infanoj, sen escepte, kiam ili komencas paroli, havas tre malfacilan, eĉ dolorigan, periodon, kiun oni povas nomi la periodon de « ne tiel sed tiel ». Tio signifas ke, kiam infano aŭdas kaj lernas orele la patrinan lingvon, li kutime, post ne longe, faras kaj eldiras vortojn, kaj konstruas frazojn, kiuj, kvankam tute logikaj kaj kompreneblaj, tamen ne estas akcepteblaj, ĉar ili ne estas tiel, kiel la plenkreskuloj uzas ilin, nelogike kaj ofte tute senracie.

Do, infanoj devas atendi dum jaroj, lerni kaj aŭskulti kiel la aliaj uzas la lingvon, por ke ili povu parkere utiligi ĝin.

Tiel, la « korektada periodo » por la simpla kaj logikema menso de infano estas ĝuste la batalperiodo de kontraŭlogiko kontraŭ logiko. Kaj ĉiuj bone scias ke ĝi restas, fine, la vivdaŭra interbatalo, kie la venkinto ĉiam estas la kontraŭlogiko. Ĉar ĉiuj neartefaritaj lingvoj estas la plej belaj simboloj de kontraŭlogiko. Malfeliĉe, tiu interbatalo neniam ĉesas, kaj ĝi restas ĝis la morto, kiu feliĉe liberigos nin ĉiujn de tiu eterna problemo de la lingvoj.

El la vidpunkto de psikologio, la « korektada periodo » ĉesas nur tiam, kiam la menso de la homo estas je la dispono de kontraŭlogiko. Alidire, post la venko de imito super kreeco, la rego de aŭdaĵoj super menskreaĵoj, nur por akordiĝi kun la kutima eraro de la respektivaj socioj. Kiom perdiĝas de la personeco, kiu tiel restas kaŝita ? Kaj la kialo de tiu-ĉi manko estas memevidenta : ĝis nun, ekzistis neniu socio kun logika lingvo.

Sed poste, kiam oni dolorige akceptis kontraŭlogikon, oni klopodas denove lerni logikon kaj logikan pensmanieron, ĉar oni devas lerni kaj matematikon kaj lokikon. Ĉu ne ridige ?

Ĉu oni iam pensos kaj serioze studos kian negativan efikon havas en la ekfloro de la personeco tiu fudamenta instruo de kontraŭeco en la komenco de la vivo kaj menskreskado ? Laŭ mi, tia instruado certe multobligas la neracian pensmanieron ĉe la homo, kiun ni ĉiumomente konstatas dum nia vivo.

Tharnidike, la fama usona psikologo, malkovris en 1922 ion novan pri la instruado de lingvoj. Lia fako estis psikologio kaj lingvo. La rezulto montris ke Esperanto estas 10-oble pli facile lernebla ol ĉiuj aliaj lingvoj. Li pruvis ke Esperanto-lernantoj ne suferas, ne kadukiĝas pro la lernado, kion kaŭzas aliaj lingvoj ; kaj ke psike ili eĉ ĝojas, ĉar ili samtempe kredas ke ĉiuj aliaj homoj (pli malpli) egale uzas energion por lerni ĝin, pro tio ke ĝi apartenas al neniu nacio.

Do, Esperanto, por la unua fojo, donas la eblecon al psikologoj esplori kio povas esti la diferenco de la personeco de tiuj, kiuj denaske estas esperantistoj, kaj kreas mense pere de iu logika lingvo, kaj tiu de alilingvanoj.

De Freud ni scias tutcerte ke 9/10 de la mensaktiveco estas senkonscia kaj ankaŭ nelogika. Kaj de Aristotelo, ni scias ke la interrilato inter parolo kaj penso estas senduba. Sed oni ankoraŭ tute ne scias ĉu estas la menso kiu kaŭzas la mallogikecon de lingvo, aŭ ĉu estas la lingvo kiu helpas ĝin. Ĉiukaze, Esperanto donas al ni la eblecon malkovri tion, kaj eble multaj konsentas kun mi por diri ke la homa socio bezonas pli multajn homojn kiuj pensas kaj agas logike.

Alia psika demando estas : ĉu, entute, kiam temas pri la plej superaj mensaktivecoj, oni povas pensi libere, senhelpe de lingvo ? Tiun-ĉi demandon eble komprenas homoj, kiuj scipovas pli ol unu lingvon. Sed respondi, eble neniu ankoraŭ povas. En tiuj mensostatoj, oni vere ne scias ĉu estas la penso kiu venas antaŭ la vortoj, aŭ ĉu estas la vortoj, kiuj sinsekve venigas la pensojn.

Krom la aspektoj de la lingva diskriminacio kiujn ĉiu bone konas, ekzistas alia psike, ekonomie kaj ĉiurilate malbona aspekto, kiu estas la kaŭzo de ankoraŭ multaj aliaj problemoj : La studentoj de la tiel nomitaj tria-mondolandoj bezonas lerni aliajn lingvojn. Ili memkompreneble « elspezas » pli da energio kaj mono por elstariĝi en siaj fakoj. Tio malkovras la gravan problemon de la nesufiĉe rapida transigo de la scienco en la tria mondo. Ili tiel restas ĉiam minimume 6 aŭ 7 jarojn malantaŭ la samkvalitaj studentoj de aliaj landoj. Kaj oni ne forgesu la sekvajn psikajn efikojn kaj malegalecojn.

Por solvi la problemojn, maljusteco, malriĉeco, nescio, malsano, la 4 talismanoj de mizero, oni bezonas la tutan homforton, sed oni plue devas elspezi nekredeblajn sumojn kaj valoregan tempon nur por lerni la lingvojn.

Espereble, la sperto de Irano kaj aliaj evolulandanoj pri Esperanto povos pripensigi la funkciulojn. Tiom da interesiĝo pri Esperanto en nia lando, kaj espereble post nelonge, en multaj aliaj landoj najbaraj, tutcerte utilos por ŝanĝi la cirkonstancojn rilate Esperanton.

Ĝ ZAHEB ZAMANI.

JULES VERNE

Iom pri la homo

La 8-an de Aprilo 1978, la franca urbo Nantes inaŭguris muzeon dediĉata al Julio Vern' kiu naskiĝis antaŭ cent kvindek jaroj en tiu urbo : Efika maniero celebri datrevenon de fama verkisto kiu entuziasmigis milojn kaj milojn da legantoj ; samtempe revenigi antaŭajn junulojn al mirindaj legaĵoj. La Nantes-muzeo, inter aliaj rimedoj, helpos la ĉiunaciajn vizitantojn malkovri ne nur genian verkiston, ankaŭ klerulon, kiu ĉe la naskiĝo de Esperanto tuj fidis al ĝi responde sian propran altiron al kompleta internacieco de la Ter-anoj ĝis akcepti la honor-prezidentecon de la Esperanto-grupo en Amiens kie li vivis post sia edziĝo.

Do, antaŭ pli ol unu jarcento, Jules Verne jam imagis kaj priskribis multajn « sciencajn fikciojn », pli ĝuste eltrovaĵojn siajn el kiuj jam pluraj iĝis realaĵoj : nukleaj submaraj ŝipoj, vojaĝoj al kaj sur la luno, lasero, de li nomita la « verda radio », televido en lia verko « la kastelo de la Karpatoj », radioaktiviga korpo en « La ĉasado al meteoroj », eĉ la klimatŝanĝoj en « De supre, returnen al malsupre ». Tankojn, aviadilojn, fuzraketojn li priskribis, jam muntis, malmuntis, kvankam neniam li havis la eblecon konatigi kun planoj de specialistoj. Jules Verne kutimis aserti : « Ĉio de homo imagebla povas, de aliaj homoj, esti realigebla ».

Aliparte, kaj tute kompreneble, li ne povis ne resti influata de « futurismo » kiam, komence de nia jarcento, nia mondo travivis veran industrian revolucion. Nedube, laŭ esploristoj pri la Vernverkaro, Jules Verne ne strikte inventis sed mirinde ekkonsciis kaj emfazis la plej etajn teknikajn elpensadojn, malkovrojn, ekrealigadojn de la industria erao. Fakte, Jules Verne ĉeestis la naskiĝon de fervojoj, tramoj, de la gaso kaj elektro, de la telefono, de la fonografo, Ktp. Sekve, okazas ke herooj liaj jam uzas trajnojn en regionoj kie, pli ol centjarojn post, fervojoj ankoraŭ ne estas instalitaj !

La scivolemo, la kuriozemo de Jules Verne estis senlima. Nelace, li amasigis konojn en fakoj plej diversaj. Neniam li hezitis kompili je bonaj fontoj, ne nur pri geografio por verki, ekzemple « La infanoj de kapitano Grant », pri geologio « La vojaĝo al centro de la tero », ankaŭ pri fiziko, astronomio, ktp.

Por tion fari, li, sen aŭtentika sciencista klereco, ĝisfunde esploras ĉiujn gazetojn kaj revuojn kiuj pere de la « Industria Societo de Amiens » venis al li, tiea kaj tiama urbestrarano. Kuzo lia, politeknikisto, iniciatis lin al matematikoj, kaj Jules Verne mirigas ĉe konstato de simpla komo kiu, pro eta mallokigo en fiziko-problemo, povas naski katastrofon ! Tiel, lia romano « De la Tero al la luno » redonos al ni kalkulojn plej ekzaktajn kiam en « De supre, returnen al malsupre » la eraroj pruntedonitaj de la aŭtoro al siaj personaĵoj, matematikistoj tute ŝanĝas la celon antaŭviditan.

Ankaŭ la maro ludis gravan rolon en la verkoj de Jules Verne. Fakte, dum sia tuta juneco nia Nantes-ano povis revi frunte al la Loire, kiu sub la fenestroj de lia naskiĝdomo kunportis al Oceano multajn plej diversajn ŝipojn. Verŝajne, tiaj revoj prisemis la junan cerbon per verko-ĝermoj uzotaj en « La artefarita insulo » aŭ « La insulo kun helikoj » kiu reprezentas Atlantidon elmergiĝanta el akvosupro por, ke nova hom-civilizado revekiĝu post tutmonda katastrofo.

Eĉ filozofion oni povas malkovri en iuj el liaj romanoj, ekzemple, pri la ŝippereantoj de la « Jonathan », kiujn oni povas identifii kiel poloj fuĝantaj la rusajn tsarojn. Alie, orgojlo de Klerulo... aŭ frenezulo, kiu celas estri la mondon. Do, ankaŭ la malbonan flankon de sciencaj inventoj li antaŭvidis kaj kondamnis kiam uzataj cele al ruinigo kaj pereigo. En la romano « Frunte al la flago », ni legas pri forrabo de eltrovanto kiu inventis maŝinon je granda eksplodpovo por detrui tutan ŝiparon. Alia verko, « Robur la giganto » temas pri invento de giganta helikoptero. En « Hektor Servadac » estas ter-parto kiu, kunportita de kometo daŭre turniĝos en la suna sistemo !

Sed, resumi ĉiujn konojn kompilitajn de Jules Verne en fakoj plej diversaj kaj de li redonataj kiel proksimaj futuraĵoj estus vere tro longa nombrado... tamen permesus pliakcenti la flankan rolon de la genia verkisto, kiu konata en multegaj landoj pere de tradukoj, sukcesis levi pasiojn en sinsekvantajn generaciojn ensemante en ilin kredon al scienca estonteco, al spacaj eventoj estritaj de la homo mem. Apostolo ankaŭ li estis pro emo al scienco utila kaj konstruema, kaj kontraŭ la minacanta kaj detruema.

Kiel oni povas dedukti, la genio de Jules Verne devenas esence el lia eksterordinara scienca racionalismo kunligita al konstanta fido je la homo. Nedube, tiu pensmaniero enkondukis la verkiston al tre optimisma kredo je bonfaroj de progresoj kiuj laŭ li, devus helpi kaj alporti al la homaro konstantan feliĉon kun malpliigo de ĉiuj penigaj streboj. Sed, neniam la genia verkisto estis antaŭvidanta la tutmondan evoluadon de la hom-rilatoj. Ja, nenia politikaj anticipoj en liaj romanoj. Aliparte, se Jules Verne antaŭvidis la rariĝon de la krudaj materialoj, li priatentis neceson de natur-ekvilibrado. Li tute ignoris ekologion. Neniu el liaj romanoj aludas pri tio.

Tamen, daŭre restas la influo de Jules Verne ĉe antaŭaj legantoj kiel ĉe novaj kaj la aŭdvidaj, modernaj aparatoj relanĉas la altiron. Fakte, Jules Verne estas unu el la aŭtoroj kiuj, tra la mondo, plej grandskale inspiris la kinoarton... arto kiun cetere li ankaŭ antaŭvidis kaj anoncis, kiel li faris pri radio, televido kaj multaj inventoj de la 20-a jarcento. Neeblas kalkuli la nombron de la filmoj eltiritaj de liaj verkoj despli ke la universaleco de lia verkaro permesis adaptaĵojn je ĉiuj gustoj aŭ tendancoj kaj la konstanta altiro de la kino aŭ televidspektantoj al fantasto kaj « fikciaj sciencoj » pliampleksigas la favoron al la verkaro de la fama Nantes-ano.

eltiraĵo el 1978-parolado en Gresillon,
enkonduko al vizito de la muzeo
« Jules Verne » en Nantes

VOĴAGO AL LA CENTRO DE LA TERO

TEMO :

Originalulo, Profesoro LIDENBROK, germana fama scienculo pri mineralogio, kaj rimarkinda poligloto, hazarde trovas malnovan pergamenon, surskribitan de Islandaj runoj. Sed la teksto ne estas en klara lingvo, ĝi estas kriptaĵo. La deĉifro de la mesaĝo konsistigas tre interesan enkondukon en la arton de kriptologio. Fine, la kriptaĵo montras la jenan tekston en malbona Latino skribita per Islandaj runoj :

« Malsupreniru en la krateron de la Jokul de Sneffens, kiam la ombro de Skartaris venas karesi antaŭ la kalendoj de Julio, aŭdaca vojaĝanto, kaj ci alvenos al la centro de la tero. Tion mi faris.

Arne Snakussemm ».

La Jokul estas Islanda malviva vulkano. La subskribinto estis fama Islanda scienculo de la 16a jarcento, granda literaturisto, alkemiisto kaj vojaĝisto.

P-ro Lidenbrok decidas refari la vojaĝon kun sia nevo kaj helpanto Aksel. La vojaĝo okazas kun mil peripetioj — kelkaj dramecaj, aliaj pli malpli humuraj. Bazita sur realaj sciencaj konoj, la romano estas streĉa, pasiiga kun diskreta humuro. Ĝi estas unu el liaj plej famaj ĉefverkoj. Oni povas rimarki, ke la romano estas funde, refuto de la tiuepoka doktrino pri *centra fajro*. Fakte, Jules Verne antaŭsugestas la nunan teorion pri la triobla konsisto de nia terglobo.

Jen du eltiraĵoj de la romano (tre interesaj)

REJKJAVIKO ANTAŬ UNU JARCENTO

(9a ĉapitro)

« La urbo etendiĝas sur tereno iom malalta kaj marĉa inter du montetoj. Granda lafofluo kovras ĝin sur unu flanko, kaj malsupreniĝas laŭ malkrutaj deklivoj, ĝis la maro. Sur la alia flanko etendiĝas la vasta golfeto Faksa, norde limigita de la enorma glaciejo de monto Sneffels. En tiu golfeto nur *Valkirio (la ŝipo veturiginta la esploristojn)* tiam. Kutime, la Anglaj kaj Francaj fiŝgardaj ŝipoj ankriĝas en plena maro, sed tiam, ili deĵoris ĉe la orientaj bordoj de la insulo.

La pli longa el la du stratoj de Rejkjavik estas paralela je la marbordo ; tie loĝas la vendistoj kaj negocistoj en lignaj kabanoj konstruitaj el ruĝaj traboj horizontale surmetitaj. La alia strato situanta pli okcidente aliras al lageto inter la domoj de la episkopo kaj de aliaj nekomercantaj personoj.

Post mallonga tempo, mi estis trapasinta tiujn mornajn kaj tristajn domojn. Foje mi ekvidis pecon de razeno, senkolorigita kiel malnova lantapiŝo frote eluzita, aŭ ian ŝajnon de arboĝardeno, kies raraj legomoj, brasikoj kaj laktukoj estus neĝenataj sur liliputa tablo. Ankaŭ kelkaj malsanaj keirantoj provis aspiri etan sunan aeron.

Proksimume je la mezo de la nekomerca strato, mi trovis la publikan tombejon, kie loko ne mankis por tomboj, kaj estis ĉirkaŭbarita de tera muro. Post kelkaj paŝoj, mi alvenis al la domo de la guberniestro, nura domaĉo kompare je la urbdomo de Hamburgo, palco kompare je la kabanoj de la Islanda loĝantaro.

Inter la lageto kaj la urbo staris la preĝejo konstruita laŭ la protestanta stilo el kalcinitaj ŝtonoj elĵetitaj de la vulkanoj men. Kiam blovis la okcidentaj ventegoj, la ruĝaj tegoloj evidente disflugis en la aeron, ege domaĝante la kultantojn.

Sur najbara elstaraĵo mi ekvidis la Nacian Lernejon. Poste mi sciiĝis de nia gastiganto, ke oni instruas en ĝi la Hebrean, Anglan, Francan, kaj Danan lingvojn, kies unu vorton mi eĉ ne konis, hontige al mi. Mi estus la lasta el la kvardek lernantoj de tiu kolegio, kaj mi estus malinda kuŝi kun ili en iliaj dufakaj ĉambroj, kie delikatuloj sufokus ekde la unua nokto.

Post tri horoj, mi estis vizitinta ne nur la urbon, sed ankaŭ ĝian ĉirkaŭaĵon. La ĝenerala aspekto estis strange malgaja. Ne arboj, preskaŭ ne vegetaĵoj. Ĉie la akraj eĝoj de la vulkanaj rokoj. La kabanoj de la Islandanoj estas faritaj el tero kaj torfo ; la muroj kliniĝas internen, ili similas tegmentojn lokitajn sur la tereno. Sed tiuj tegmentoj estas relative fekundaj herbejoj, herbo tie kreskas sufiĉe bone, kaj oni zorge falĉas ĝin dum la fojnotempo, ĉar la bestoj venus paŝtiĝi sur tiuj verdantaj loĝejoj ».

. . . . . .

NOTO. — Tiam, Islando estis Dana kolonio.

SUBTERA MAGNETA FULMOTONDRO

(35a ĉapitro)

(Profunde en la tero, la vojo estis barita al la esplorantoj de vastega subtera maro. Helpitaj de Hans, Islanda dungito, ili konstruas floson kun masto, velo kaj stirilo, por transveturi la maron).

« Estos fulmotondro ; mi diras, etendante mian manon al la horizonto. Tiuj nuboj malleviĝas al la maro, kvazaŭ ili volus dispremi ĝin ! »

Ĝenerala silento. La vento silentas. Naturo ŝajnas mortinta, kaj ne plu spiras. Ĉe la masto sur kiu mi jam vidis ekflami etan fajron Sankta-Elmo (°), la ne plu ŝvelita velo pendas senforme faldiĝanta. La floso estas senmova meze de densa senonda maro. Sed se ĝi ne plu naĝas, kial konservi tiun velon, kiu povus renversigi nin je la unua frapo de la tempesto ?

« Ni malferlu ĝin, mi diras, kaj ni faligu la maston ! Por singardo !

— Ne, per la diablo ! ekkrias mia onklo, centfoje ne ! La vento kaptu nin ! sed fine ni vidu bordajn rokojn, eĉ se nia floso frakasiĝos milpecen kontraŭ ilin ! »

Li ne findiras tiujn vortojn, kiam la suda horizonto subite aliaspektiĝas. La akumulitaj vaporoj solviĝas en akvon, kaj la aero fortege suĉita por plenigi la vakuojn produkitajn de la likviĝo, fariĝas uragano. Ĝi alvenas de la plej foraj ekstremaĵoj de la kavernego. Mallumo pli obskuriĝas. Apenaŭ mi povas skribi stumpajn notojn.

La floso leviĝas, saltegas. Mia onklo estas sterneĵetita. Mi rampas ĝis li. Li forte sin alkroĉis al kabla fino, kaj ŝajne konsideras kun plezuro la spektaklon de la furiozantaj elementoj.

Hans ne moviĝas. Liaj haroj alblovitaj al lia flegma vizaĝo faras al li strangan fizionomion, ĉar ĉiu harfino estas hirtita de longaj fajreroj. Lia terura vizaĝo similas tiun de antaŭdiluva homo, samtempano de iktiosaŭroj kaj de megatorioj.

Tamen la masto rezistas. La velo ŝveliĝas kiel tuj krevonta veziko. La floso forglitas kun netaksebla rapideco, sed malpli rapidege ol la akvogutoj pelitaj sub ĝi ; ilia rapideco desegnas rektajn kaj netajn liniojn.

« La velon, la velon ! mi diras, signante ke oni malferlu.

— Ne ! respondas mia onklo.

— Nej ! diras Hans, malrapide movante sian kapon.

Dume, la pluvo formas blekantan kaskadegon. Sed antaŭ ol ĝi alvenos al ni, la nuba kurteno disŝiriĝas, la maro ekbolas, la elektro produktita de vasta kemia ago okazanta en la superaj tavoloj ekfumas.

Ni estas elĉerpitaj de lacego. Hans estas ĉiam sana. La floso nevarieble kuras sud-orienten. Ni jam traveturis pli ol ducent laŭgojn ekde insuleto Aksel.

Je tagmezo la uragano pli furiozas. Mi devas forte alligi la objektojn konsistigantajn nian kargon. Ĉiu el ni devas sin alligi : la ondoj sin ĵetas super niaj kapoj.

Ekde tri tagoj neeblas diri unu vorton. Ni malfermas la buŝon, movas la lipojn ; eliras neniu perceptebla sono. Eĉ parolanta ĉe la orelo, ni ne povas aŭdi.

Mia onklo proksimiĝas al mi. Li prononcas kelkajn parolojn. Mi komprenas, ke li diras : « Ni estas forperditaj ! » Sed mi ne estas certa. Mi decidiĝas skribi al li tiujn vortojn : « Ni malferlu la velon ». Li signas, ke li konsentas.

Lia kapo ne havis tempon releviĝi de malsupre supren, kiam fajra afero aperas ĉe la rando de la floso. La masto kaj la velo estas kune forblovitaj, kaj mi vidas ilin ŝvebantaj ĝis netaksebla alteco ; ili

similas pterodaktilon, tiun fantastan birdon de la praaj epokoj.

Mi tremas pro teruro. La bulo duone blanka, duone lazura, dika kiel dek-cola bombo malrapide ŝvebas, kaj rapide turniĝas pro la vipado de la vento. Ĝi iras ĉi-tien, tien, grimpas sur unu trabon de la floso, saltas sur la proviantan sakon ; iom descendas, saltegas, preskau tuŝas la pulvokeston. Horore ! la pulvo eksplodos ! Ne. La blindiga afero deiras, alproksimiĝas al Hans, kiu fikse rigardas ĝin ; poste al mia onklo, kiu sin ĵetas surgenue por eviti ĝin ; venas al mi kiu estas pala kaj tremanta en la brilega lumo kaj varmego ; ĝi ĝiras apud mia piedo, kiun mi provas posten retiri sensukcese.

Odoro de nitrozita gaso plenigas la atmosferon, penetras la gorĝon, la pulmojn. Ni sufokas.

Kial mi ne povas retiri mian piedon ? ĉu ĝi estas nititra al la floso ? Ha ! la falo de tiu elektra globo magnetizis ĉiujn ferajojn sur la floso ; la instrumentoj, la iloj, la armiloj agitiĝas, sin interfrapas kun akuta klakado. La najloj de mia ŝuo forte alteniĝas al fera plato inkrustita en la ligno. Mi ne povas detiri mian piedon !

Fine, per ega ŝtreĉiĝo, mi eltiras je la momento kiam la bulo estis kaptonta ĝin per sia ĝirado, kaj min fortrenus...

Ha ! kia intensega lumo ! la globo eksplodas ! Ni estas superŝutitaj de flameroj !

Poste, ĉio estingiĝas. Mi ne havis tempon vidi mian onklon sternantan sur la floso. Hans ĉiam tenas la rudron, kaj « sputas fajron », pro influo de la elektro penetranta lin.

Kien ni iras ? Kien ni iras ?

.....

Nova bruo aŭdiĝas. Evidente, ondoj rompiĝantaj sur rokoj !

.....

(*) Fajro sankta-Elmo estas flametoj aŭ sparkoj aperantaj ĉe la pinto de ĉiuj antenoj, mastoj, jardoj, sur la kabloj, kaŭzitaj de la atmosfera elektro. (Noto de la tradukinto).





Unue, kio estas MEM ? Ĝi estas Mondpaca Esperantista Movado, kaj ĝia 8-a Ĝenerala Konferenco okazis en Varna (Bulgario) dum la 63-a UK. MEM estis kreita en 1953, en momento, kiam ŝajnis ke la mondo dronas en senprecedenta kataklismo. Pro diversaj kaŭzoj la ĉefaj esperantistaj organizoj staris ekster la konkreta batalo por la paco, kio, ho ve, ne estas esperantista ekskluziveco... Estis necese starigi el la esperantista movado, malgraŭ ĉio profunde pacama sed ofte ligita al malnovaj utopioj, voĉon alvokantan al konkreta batalo kontraŭ la militinstigantoj, alvokantan al racio kaj paco.

La progresemaj esperantistoj scias, ke la konfliktoj havas aliajn kaŭzojn ol la lingvajn diferencojn, eĉ se tiuj lastaj estas obstaklo por kompreno inter la popoloj, inter aliaj obstakloj ofte pli gravaj ! Ili do devis aŭdigi sian voĉon kaj organiziĝi por alporti sian ŝtonon al la tiel fragila konstruaĵo de la paco. Aŭdigi sian voĉon samtempe ĉe la aliaj esperantistoj kaj ĉe ĉiuj progresemaj organizoj. El tio naskiĝis MEM, en Septembro 1953, en la aŭstria urbo ST-POLTEN. Kvardeko da esperantistoj el nur 5 landoj ĉeestis, sed kia progreso poste !

La oficiala organo de MEM « PACO », de tiam aperis seninterrompe, kaj 19 landoj eldonis ĝin (9 socialismaj kaj 10 kapitalismaj), en Eŭropo kaj en Azio. Nuntempe « PACO », estas eldonata en Bulgario, 6-foje en jaro, kaj al ĝi aldoniĝas kelkaj numeroj eldonataj de diversaj landaj sekcioj de MEM. En 24 landoj oni trovas sekcion aŭ peranton de MEM. Ĝiaj gvidantoj kaj aktivuloj partoprenis multajn internaciajn konferencojn organizitajn de diversaj porpacaj movadoj kaj antaŭ ĉio de Monda Packonsilio. En 1973 Monda Packonsilio (MPK) kaj MEM subskribis interkonsenton de kunlaborado. Naciaj sekcioj de MEM kunlaboras kun la pacmovado kaj aliaj organizoj batalantaj por la paco. Por citi nur unu freŝdatan faron, la Sekretariaro de MEM antaŭ nelonge sendis alvokon por malarmado kaj kontraŭ la neŭtrona bombo al 145 esperantistaj organizoj kaj periodaĵoj en la tuta mondo.

Ni intencas daŭrigi kaj disvolvi nian agadon por ke ĉiam kreskanta nombro da esperantistoj ekkonsciu, ke ili devas partopreni la komunan batalon, kaj estas ege dezirinde, ke en proksima estonto la esperantistaro estu pli vaste reprezentata en la ĉefaj porpacaj konferencoj. Dezirinde antaŭ ĉio por la paco, dezirinde ankaŭ por Esperanto. Ni cetere turnas nin samokaze al ĉiuj progresemaj organizoj por montri al ili ke L. I. estas grandvalora instrumento, fariĝanta necesa pro la nevenkeblaj teknikaj problemoj levataj de la gravega disvolviĝo de la internaciaj rilatoj.

William GILBERT.

Membro-fondinto kaj ĝenerala sekretario de MEM

Fotografado - Fotografajo - Fotografio

Ĉi-tie estas tri vortoj. Sed tiuj vortoj signifas, klarigas tre malsimilajn aferojn. Multaj homoj fotas kaj faras fotografadon, kaj ankaŭ multaj homoj faras fotografajojn, sed tro malmultaj homoj faras fotografion. Tamen ĉiuj dezirus, esperus fari fotografion.

Kiel oni povus fari fotojn, kiuj estu fotografio ?

Unue, oni, havu bonan fotilon, ĉar sen bona ilo ne eblas bone labori. Tamen ne forgesu, ke la cerbo devus senĉese gvidi la manon kaj la ilon. Por ke la cerbo povu gvidi la manon kaj la ilon, ĝi devas koni multajn aferojn. Inter ili, la unua estas bona kono de la ilo. Do, se vi havas propran fotilon, pristudu ĝin tre bone. Vi devas koni la plej bonan manieron uzi la diafragmon kaj la obturilon. Se vi havas fotaparaton kun ŝanĝeblaj objektivoj, memoru, ke la objektivo ne ŝanĝas la perspektivon ; tio, kio ŝanĝas la perspektivon, estas nur la loko, de kie vi fotas. Krome, vi devas tre bone koni la filmon aŭ la filmojn, kiujn vi uzas. Tiamaniere, vi lernos kiajn kontrastojn via filmo povas kopii. Kutimu uzi nur unu aŭ du malsimilajn filmojn, sed ĉiam la samajn. Nuntempe, ĉiuj filmoj estas tre bonaj. Tamen, ŝajnas al mi, ke la ILFORD filmoj estas pli bonaj ol la aliaj, ĉefe rivelitaj per MICROPHEN je 20-21° C (por blanka/nigra foto). La sentiveco de tiuj filmoj povas grandiĝi ĝis 400 asa por FP 4, ĝis 3200 asa por HP 5 ; la tempo de rivelado samtempe grandiĝas. Sed la rezultoj restas tre bonaj. Por viaj kutimaj filmoj, uzu nur unu rivelilon, kiun vi bone konos. Tiamaniere, vi povos antaŭvidi la rezultojn. Ankaŭ ĉiuj riveliloj estas bonaj ; estas la maniero ilin uzi, kiu malsimiligos la rezultojn. Konante vian aŭ viajn filmojn kaj vian rivelilon, vi povos larĝigi aŭ mallarĝigi la kontraston de viaj negativoj.

Kiel scii, kiam oni devas uzi tian aŭ alian diafragmon, tian aŭ alian rapidon de la obturilo ?

Tio estas tute malsimpla ; tamen, oni diros, ke por moviĝantaj subjektoj, oni pensos pri tri punktoj :

1° la rapideco de la subjekto — 2° la distanco inter la subjekto kaj la fotilo — 3° la direkto de la movo kompare kun la akso de la fotilo. Mi tuj klarigos la tri punktojn.

La movrapideco de la subjekto :

Se vi deziras foti ruliĝantan veturilon aŭ ludantajn infanojn, vi devas uzi malsimilajn rapidojn de la obturilo. Por pli da facileco, oni nomos *rapidon de la obturilo « rapido »* tute simple.

La « rapidoj » estas 1", 1/2", 1/4", 1/8", 1/15", 1/30", 1/60", 1/125", 1/250", 1/500", 1/1000", (1/2000"). Kiel vi povas rimarki, irante de maldekstre dekstren, ĉiu rapido estas dufoje pli longa (proksimume) ol la sekvanta, kaj inverse.

Do, por foti la ruliĝantan veturilon, vi uzos rapidon, de 1/125" ĝis 1/1000" laŭ la rapideco de la veturilo. Por foti la ludantajn infanojn, uzu 1/125" aŭ 1/250" maksimume. Sed vi devas eksperimenti la plej bonajn rapidojn kompare kun la movrapideco kaj via fotaparato.

La distanco inter la movanta subjekto kaj la fotaparato.

Ni ekzamenu la problemon de la distanco. Kiam io moviĝas malproksime de vi, vi havas multe da tempo por ĝin rigardi, sed kiam ĝi moviĝas proksime aŭ tre proksime de vi, vi havas malmultan aŭ malmultegan tempon por ĝin observi : do, se vi deziras, per via fotilo, foti tian subjekton, vi povas elekti grandan « rapidon » en la unua kazo kaj tre grandan « rapidon » en la dua kazo. Nun, vi jam disponas pri du elementoj por elekti la korektan « rapidon ». Ankoraŭ unufoje, vi devas eksperimenti pripensante, kion mi jam skribis.

La direkto de la movo.

Finfine, ni ekzamenu subjekton, kiu moviĝas antaŭ kaj orte al la fotilo. La subjekto eniras kaj eliras, vian vidkampon, tre rapide. Do, por foti ĝin, vi devos uzi grandan « rapidon ». Se, male, la subjekto moviĝas al vi laŭ la fotaparata akso, vi havos tempon por ĝin vidi tra via aparato. Do, vi povos uzi malpli grandan « rapidon ».

Se la subjekto moviĝas inter la orta direkto kaj la direkto de la fotila akso, vi elektos « rapidon » inter tiu de la unua kazo kaj tiu de la dua kazo. Ju pli ofte vi eksperimentos (ĉefe se vi skribas viajn rezultojn), des pli rapide vi faros bonajn fotografajojn de movoj, sed ankoraŭ ne fotografion de movoj.

Ĉar sekvante tiujn konsilojn, vi haltigas la movojn. Tiuj fotoj povas esti interesaj por montri la pozicion de sportuloj ; tamen la movfotografio ebligas fortan impreson de movo. Kiel fari tion ? Vi elektas pli malgranda « rapidon » ol tiun necesan kaj vi sekvas la subjekton tra via fotilo. Vi elklikas la obturilon dum vi sekvas la subjekton. Eksperimentu, eksperimentu ! ! Kaj tre ofte rigardu la fotografiajn revuojn. Oni multe lernas en ĉi-tiuj.

Kun la Aŭgustaj partoprenantoj de la tria staĝo, ni provos tiujn diversajn teknikojn por fari movfotografiojn.

Bone laboru ĉiuj fotografantoj.

W. GRELA.

ANONCETOJ

Esperantlingvaj programoj de Radio-Vieno sur mallongaj ondoj.

Ĉiun Sabaton je la 17,45 h. MET sur mallongondo 48,74 m. (= 6155 kHz) (depende de cirkonstancoj, pli bone sur 19,86 m)

Dekminuta programo

Ripetata ĉiun tuj sekvantan dimaĉon, matene je la 06,45 h. MET sur 48,74 m (eventuale ankaŭ 16,82 m).

Folkloraj kantoj

Tiuj, kiuj serioze okupiĝas pri folkloraj kantoj... skribu al Goar Engeländer, Thomasweg 3, D-4796 Salzkotten.

El nia libroservo

NORMANDAJ RAKONTOJ
de Guy Maupassant
traduko de R. Dupuis

KONTRIBUANTO AL LA ESPERANTA KULTURO

La 2an kaj 3an de decembro okazis en La Chaux-de-Fonds kultura semajnfino por celebri la dekan jaron de la Kultura Centro Esperantista. Dum tiu ĉi manifestacio, mi registris intervjuon de Giorgio Silfer, la ĉefredaktoro de « Literatura Foiro ».

— Giorgio Silfer, kiu vi estas ?

— Mi estas Italo, ankoraŭ ne tridekjara, kiu loĝas nuntempe en La Chaux-de-Fonds. Dum tri jaroj pli frue, antaŭ ol mi venis ĉi tien, mi instruis en Finnlando ; pli precize, mi estis direktoro de sekcio de romanidaj lingvoj en vespera altlernejo. Mia profesio estas ĵurnalisto kaj kursestro de Internacia Feria Altlernejo en Svislando. Pri miaj studoj, mi estas magistro pri okcidentaj eŭropaj lingvoj kaj literaturoj, kaj ankaŭ instruisto por elementa lernejo.


— Kio estas por vi Esperanto ?

— Mi alvenis al Esperanto relative frue en mia vivo, ĉar mi estis nur dek-kvarjara, do temis pri elekto, kiu maturiĝis en mi unue pro scivolemo, ĉar mi ĉiam havis grandan scivolemon precipe je la plej kuriozaj aferoj, do, ekzemple, mi interesiĝis pri grafologio en tiu epoko, pri proverboj k.t.p... Interalie mi havis la okazon vidi sur la breto de la libraro de mia bofratino kelkajn volumetojn pri Esperanto kaj tiel, per mi mem, mi eklernis la lingvon kaj, post du-tri jaroj, mi diplomiĝis kiel instruisto.

Kio povas esti por mi Esperanto ? Tio estas longa demando. Mi ne vidas fakte la demandon tre senchava pro la simpla fakto, ke demandi al mi, kion signifas por mi Esperanto estas kvazaŭ demandi al mi, kion signifas por mi la itala. Esperanto estas efektive la dua lingvo, kiun mi parolas. Mi konsideras min dulingvulo tiurilate : itala kaj esperanta. Do, por mi, unuavice, la lingvo estas ilo, per kiu mi povas ĉion esprimi, kion mi trovas tre fleksebla kaj tre taŭga, kelkfoje multe pli taŭga, se mi volas pensi sur internacia bazo pri internaciaj problemoj, kiuj efektive ne estas tiom facile esprimeblaj kaj trafe esprimeblaj ĉiam pere de mia nacia itala lingvo.

— Kio estas por vi « Literatura Foiro » kaj kiujn esencajn celojn vi deziras atingi pere de via revuo ?

— « Literatura Foiro » ne estas mia revuo sed la revuo de tuta rondo, rondo de esperantologoj kun itallingva kultura fono nomata « La Patrolo ». Ĝi esprimas la kulturpolitikon de la Patrolo kaj resumi ĝin ne estas tiel facile. Certe, mi emfazus eble tro multe kelkajn aspektojn kaj forlasus aliajn. Sed unuavice, almenaŭ en niaj principoj, en la principoj de la Patrolo, estas baza kredo en la fakto, ke por havi vivantan lingvon, oni bezonas literaturon, sed fakte ne ekzistas literaturo se mankas, ni diru, « etna ariero » kaj ni konsideras la esperantan kolektivon la efektiva ariero de la Internacia Lingvo. Tio signifas, ke la homoj, kiuj parolas Esperanton estas embrio de iu komunumo, de iu popolo, kiu povas esprimi propran kulturon eĉ alternativan al la oficiala. Kompreneble, tio ne estas iomete modernigita versio de la Interna Ideo. La Interna Ideo, laŭ mi, estas unu el la kulturaj riĉaĵoj sed tio, kio estas esenco en la komunumo de la Esperanto-parolantoj estas ilia ebleco produkti pere de Internacia Lingvo kulturon, kiu havas dimension efektive internacian. La problemo nuntempe estas, ke la kulturo en Esperanto ne estas tiom preta internacie konkurenci, pozitive konstrui, krei, kiom estas preta la lingvo. Per unu sola frazo, mi povus diri, ke la rondo de la Patrolo opinias, ke dum 90 jaroj la lingvo pruviĝis taŭga por esprimi ĉion. Nun estas la momento, ke la lingvo esprimu ion, ion originalan, ion maturan, ion enviindan fare de nacilingvaj kulturoj.



Silfer ĉe sia skribtablo, en la ĉefredaktejo de « Literatura Foiro ».

— Kio estas, laŭ via opinio, esperantista literaturo kaj kio viadezire ĝi estu ?

— Esperantista literaturo, ĝuste se oni uzas la adjektivon « esperantista », signifas unuavice la literaturon, kiu interesiĝas pri la Esperanto-Movado, do, pri tiu speco de aparta subkulturo, kiu formiĝis en kongresoj, en renkontiĝoj. Iu speco de subkulturo, kiu ekzemple trovis elstarajn reprezentantojn en la skolo de Schwartz aŭ pli proksime al ni en Beaucaire. Do temas pri tiu literaturo, kiu parolas pri la verda mondo, pri la kongresoj kaj kiu ĝenerale estas sprita kaj donis elstaran kontribuon precipe en la kampo de la lingva riĉiĝo, de la kalemburoj kaj de la malkovro de la latentoj de la lingvo.

Alia afero estas la esperanta literaturo. Se tia, kia mi volus ĝin nomi, kiam mi diras, ke Esperanto estas internacia lingvo, mi pravas. Sed kiam mi diras, ke la literaturo, kiu esprimiĝas en Esperanto estas internacia, mi ne ĉiam pravas. La afero ne estas tiel ekvivalenta. Tre ofte, la produkto de la literaturo esperantlingva estas simple la reflekto de iu modesta medio, tre fermita, provinceca eventuale, kiu ankoraŭ ne estas internacia en la senco, kiun ni asignas al tiu ĉi vorto, nome de io supera al la malvastaj horizontoj de nacieco.

Pro tio, « Literatura Foiro » klopodas doni sian kontribuon kaj mi esperas, ke se multaj homoj helpos per siaj konsiloj, per sia legado, per sia subteno morala kaj ankaŭ eventuale financa, ni povos fari kelkajn paŝojn antaŭen, ĝuste al la direkto de tiu deziro. Dum unu jarcento, Esperanto provis pruviĝi taŭga por diri ĉion ; nun estas la tempo, en la dua jarcento, ke Esperanto proviĝu taŭga por diri ion.

Intervjuis Suzanne Bourot.

TRI RUMANAJ POEZIAĴOJ

Tradukitaj de Prof. Toma Macovei

ŜEKSPIRO

Ŝekspir' faris la mondon en sep tagoj.
La unuan tagon, li faris la ĉielon, la montaron kaj la abismojn de l'anim'.
La duan tagon, faris li la riverojn, la marojn, la oceanojn kaj ceterajn sentimentojn,
Kaj donis ilin al Hamlet', al Julio Cezar', al Antonio, Kleopatra kaj Ofelia,
Al Otelo kaj al aliuloj,
Por ilin mastrumi, ilin kaj ilian posteularon
En senfina daŭro.
La trian tagon, li amasis ĉiujn homojn
Kaj instruis ilin la gustojn :
La gusto de la feliĉo, de l'amo, de la senesper',
La gusto de la ĵaluzo, de la gloro kaj tiel plu
ĝis kiam finiĝis ĉiuj gustoj.
Tiam alvenis ankaŭ iaj individuoj kiuj malfruiĝis.
La kreinto karesis ilin sur la kapo kompete,
Kaj diris ke restis al ili nenio, ol fariĝi
literaturaj kritikistoj
Kaj kontesti al li la verkon.
La kvaran tagon kaj la kvinan rezervis li al la rido.
Li permesis al la klaŭnoj
Rulfali
Kaj lasis la reĝojn, la imperiestrojn
Kaj aliajn malfeliĉulojn distriĝi.
La sesan tagon, li solvis iajn administrajn problemojn :
Iniciatis tempeston
Kaj instruis la reĝon Lear'
Kiel li devas porti pajlan kronon.
Restis ankoraŭ kelkaj skoroj de post la kreo de l'mondo
Kaj li kreis Riĉardon la trian.
La sepan tagon, rigardis li se havas plie ion fari —
La direktoroj de teatroj jam plenigis la teron per afiŝoj —
Kaj Ŝekspir' pensis, ke post tiom da laboro,
Meritis ankaŭ li vidi spektaklon ;
Sed unue, ĉar li estis supermezure laca,
Li iris morti iom.

Marino Sorescu.

DISIĜO

Estas nenio, Maria,
Ke vi min ne amas plu.
Morgaŭ matene je sepa horo
Forgesos ankaŭ mi la tutan frenezegon de ia feri'.
Mi forgesos ĉion, kiel cirkan spektaklon.
Morgaŭ matene je sepa horo
Mi forgesos ke mi amis vin.
La venonta nokto estos decidiga !
Noktomeze,
Kiam vi dormos, estetike kiel kato,
Mi ĵetos al vi ĉi-tiun poemon
Kiel revolveron per kiu mi memmortiĝis !
Sed por mi ĉio ĉi ne havas gravecon.
Mi amos pasie
Aliajn milionojn da aĵoj.
Juneco mia, neelĉerpebla kaj fervora,
Povas enkonduki en mia koro,
Tre ejhava,
Aliajn milionojn da amoj.
Mi amos la mondon kiu naskiĝas nun,
Kun ĝiaj maŝinoj, kiuj kantos novan muzikon, nekonjektitan,
Kun viaduktoj transĵetitaj suple super la plej malaltaj valoj,
Kun ĝiaj libroj, kiuj efektiviĝos el libereco.
Mi amos la homojn,
Ĉiujn homojn,
La plej trivialajn kaj la plej bonajn homojn,
Kun ardega pasio,
Kun koro-surprizo,
Kun animo granda kiel la ĉielo de la printempoj
Lernos mi ilin ami.
Estos al mi iom malfacile,
Sed estas nenio, Maria.
Iun tagon, Eŭropo rekonos min,
Kaj vi ekscios el gazetoj
Ke mi promenadas, kiel sur bulvardo, sur meridianoj,
Inter Parizo — Moskvo — Capetown.
Mia juneco invados la mondon.
Mia juneco, kiu disfluis tra viaj fingroj,
Donacos sian animon per miloj kaj milionoj da novaj vortoj
Al la tuta mondo.
Kaj mi memoros ĉiam,
Kun rideto sur lipoj,
De vi, Maria,
Ĉar vi postrestos ie malantaŭe.
Ĝuste en ĉi tiu nokto decidiga.

Aleksandro Lungu.

LA TIMULO

Vintro. Nokto brila kiel en fabeloj : sukeraj arboj, kristala kampo, spegula lageto, kaj en la larĝa, senlima universo, la giganta lustro de la ĉielo ekbruligas unu post alian la lumojn, kiel en senmezura salonego de danco. La vivularo de la dezerto estas ebriigita de ĉi tiu ĉarmo : la birdoj flugas kiel dum la tago, la lupo kuŝas sur la piedegoj en veproj kaj rigardas senmove ; la vulpo staras apud sia kaŝejo kaj ne decidiĝas eliri ĉason ; la sciuro alkliniĝas la branĉoj unu al la alia kaj vagadas kiel dibociulo trans la tuta arbaro. Kaj la leporo ekkuris ludadi. Mallaŭte, aŭskultante, tentate, eliris iom post iom el elradikita arbaro, kaj kiam atingis la randon, kaj vidis la vastecon brilantan de neĝo, komencis saltadi de ĝojo :

« Eble mi renkontos ankaŭ amikon », diris al si la leporeto.
Kaj la penso respondis :
« Eble vi renkontos ankaŭ amikon... »
Kaj ree, tsup, tsup, la leporo saltadas ĝoje :
« Eble mi trovos ankaŭ amikinon ».
Kaj la penso :
« Eble vi trovos ankaŭ amikinon ».
Kaj kunirante tiel, la leporeto kaj la penso interparolas.
« Kia lumo ! kaj tamen la luno ankoraŭ ne supreniris ».
« ... kaj tamen la luno ankoraŭ ne supreniris ».
« Sed ĝi supreniros ».
« ...ĝi supreniros ».

Kaj, kiel li iris laŭ la rando de valeto, la leporeto haltis momente por ripozi. Tiam, el malantaŭe leviĝis, blanka ankaŭ ĝi kiel glacio, la luno. La steloj ekpaliĝis, la arbaro, la arboj, la tufoj demetis subite sian ombron, kaj la leporeto petriĝis de timego : ĝuste apud ĝi etendiĝis sur la teron fimontrajo kun du teruraj kornoj. Post momento de timego, la leporeto distendis sin kiel kordo, kaj ekkuregis, ruliĝis en valon, venis rulfalante kiel bulo, poste stariĝis, kaj ree ruliĝis ĝis malsupre ; poste prenis la rektan linion tranĉante la kampon. Ĝi haltis ĝuste en kanaro de la lageto. Tie, apenaŭ spirante, buliĝis kun malfermitaj okuloj... por ne vidi plu sian ombron !

el « La mondo de tiuj kiuj ne parolas »
de Emilio Gireleanu.

POR VIA DISTRO

Solvo de la antaŭa problemo


Anagramvortoj

	1	2		3	4	5	6	7	8	9
1	E	Ŭ	K	A	R	I	S	T	I	O	J
	S	■	O	■	E	R	■	U	L	■	■
2	T	O	N	D	O	M	A	Ŝ	I	N	O
3	E	■	D	I	S	A	Ĝ	I	O	■	B
4	T	R	U	A	T	■	A	T	■	K	E
5	I	■	K	■	A	N	■	E	N	U	I
6	K	A	Ŝ	I	T	A	■	C	A	R	■
7	I	■	N	■	O	B	E	O	N	T	O
8	S	T	U	F	■	O	R	■	I	A	J
9	T	I	R	E	O	■	C	I	S	■	T
10	O	R	O	N	T	I	O	■	M	I	O



NOVA PROBLEMO

KRUCVORTOJ (proponitaj de S. Bourot)



Horizontale :

1) Ŝancelas.

2) Diferenca. — Sufikso. — Malplezuri pro senintereso (S.F.).

3) El ĝi, Dio konstruis virinon (S.F.) — Interjekcio — Membro (S.F.).

4) En formulo, mallongigo por metalo. — Ekvatora arbo. — Subjunkcio.

5) Ĝi povas esti fotografa, digesta aŭ ŝtata.

6) Tia estas la tranĉita brako de la marstelo.

7) Flava likvaĵo (S.F.) — Persona pronomo.

8) Noto. — Amplekso de la instruiteco de persono. — Prepozicio.

9) Movo en ia direkto. — Numeralo. — Hunde bleki (S.F.).

10) Malfrua (S.F.). — La granda estas arde dezirita.

11) Radioŝtonoj.

Vertikale :

1) Vejnita kiel iu kalkŝtono.

2) Malsame. — Azia ŝtato (S.F.).

3) Movebla karnorando de la buŝo (S.F.). — Faru ion ! — Angulo (S.F.).

4) Noto. — Subite sin montris (S.F.). — Plej ĉiupova estaĵo (S.F.).

5) Pederastio (S.F.).

6) Signo por rekoni ion.

7) Simbolo de magnezio. — Amata (S.F.). — Sufikso.

8) Karafo aŭ flakono. Ĉina mezurunuo.

9) Oblikva transversa tranĉo de lato (S.F.) — Japana zono (S.F.) — Piedvesto (S.F.).

10) Kortobirdo (S.F.) — Donaco de la edzino al la edzo.

11) Butikoj, kie oni vendas dolĉaĵojn.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

FOJO - FOJE (PIV)

Difino : Fojo : ĉiu el la okazoj, kiam io fariĝas.

Kiom da fojoj ? Kioman fojon ? je kioma fojo ?

Li pagis tri fojojn, je la unua fojo, unu fojon por ĉiam, per unu fojo, ĉiun fojon — ĉiufoja pago, refoja pago.

Foje (unu nura fojo)

Kiomfoje ? unufoje, pli-ol-unufoje, kelkfoje, multfoje, iafoje, unuafoje, samfoje.

— Foje estis reĝo — la koko kriis trifoje, ĝi triafoje kriis.

Foje... foje : foje ŝi ridis, foje ŝi ploris — foje-foje revenas la malnovaj revoj.

NI KOMPARU

Foj kaj **obl :**

Foj por montri ripeton : dufoja pago (la sama persono pagis du fojojn).

Obl montras multiplikon : duobla pago (en la sama momento de unu aŭ du personoj).

Foje kaj **Iam.**


Foje (por ago nur unufoja) foje mi vizitis lin.

Iam (povas montri ripeton de ago) iam mi ofte vizitis lin.




Bonvoleco kaj malfacileco :


Por la unua kaj la lasta fojo mi venis en Afrikon por esti la Paska Leporo !



Konstanta strangeco :

Ege kapricema estas tiu veturilo ! ; ĉiufoje, kiam ni forlasas la aliajn veturilojn en parkejo, ĝi aŭdigas hororajn kriojn !





Interhelpi sin :

Mia kara, ĉu mi povas plian fojon peti vian helpon ? Mia kaprideto tute rifuzas mian kaprinan lakton ; ĝi ĉiam direktiĝas al vi ; ja, vi estas multe pli bona nutristino ol mi ! Tamen estu certa, ke ankaŭ mi mamnutros vian bovideton, se bezono montriĝos.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (160 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (240 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (4,80 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (50 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (35 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk Frankfurt (M) 2347 59-601 (18 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 42-10° - D ALICANTE (650 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (10 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — **p.ĉ.** 23/16532 (7000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (10 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (20 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (40 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (10 us. dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (10 us. dol.).

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (35 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro R. Kent Jones, 452 Aldine, Apt. 501 - CHICAGO, Illinois 60 657 (10 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 10 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 1 de 1979, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Cet « Entre nous » risque de ressembler à celui qui paraît chaque année à la même époque. L'hiver n'est évidemment pas une période de grande activité spectaculaire. C'est celle où la récolte de l'été se prépare. Que sera cette récolte ? C'est l'ensemencement qui la détermine en grande partie et, pour ce travail, le manque de main-d'œuvre se fait cruellement sentir, ce qui explique une certaine routine que des bras nouveaux et aussi plus nombreux pourraient secouer.

L'année 1979 ne s'annonce cependant pas trop mal, et déjà de nombreuses inscriptions nous sont parvenues. Un nombre de passages plus important que l'an dernier, pour la période mai-juin, est déjà programmé. Les quelques modifications apportées au programme du deuxième stage semblent bien accueillies. Mais, de la correspondance reçue, nous retirons la certitude que pour beaucoup les « intentions » du troisième stage n'ont pas été bien comprises. La photographie n'est pas l'unique activité de cette période ; comment pourrions-nous recevoir dans le laboratoire plusieurs dizaines de personnes ? Mais la photographie, les danses folkloriques et d'autres activités semblables, conçues pour faciliter des échanges en espéranto, seront privilégiées au lieu d'être considérées comme secondaires. Il n'en reste pas moins que le programme du troisième stage prévoit « étude et pratique de la langue », ce qui suppose l'organisation d'un cours pour débutants et de « groupes de pratique ». La photographie, la danse, etc., seront les supports de groupes de pratiques, mais pas les seuls. Elles seront surtout des activités d'initiation manuelle et artistique.

Je renouvelle mon appel, qui n'a jusqu'à maintenant reçu que peu d'écho, pour que des amis viennent cet été s'initier au fonctionnement des stages afin de prendre éventuellement, si leur expérience leur semble positive, la responsabilité d'une période d'activité de temps à autre. Car, si pour l'ensemencement c'est la masse de la tâche qu'il faudrait partager, en ce qui concerne la récolte c'est la répartition des responsabilités dans le temps qu'il est souhaitable de réaliser.

P. BABIN.

INTER NI

Vintro ne estas periodo de granda videbla aktiveco sed de preparado de la somera rikolto. Koncerne Gresillon ni pli kaj pli konstatas, ke dum tiu grava preparperiodo sentiĝas manko de brakoj. Rutino estos tute foskuita nur de novaj pliaj brakoj.

Tamen 1979 anonciĝas favora ĉefe dum majo kaj junio kiam vizitos la kastelon francaj grupoj kaj ankaŭ nederlandaj kaj hispanaj esperantistoj. Ŝajnas, ke la kelkaj ŝanĝoj en la disvolviĝo de la someraj programoj estas favore akceptitaj krom koncerne la tria periodo, pro miskompreno. Ni devas substreki ke la artaj aktivaĵoj ne plu estos duagravaj sed ke ankaŭ la pure lingvostudaj ekzistos. La programo anoncas « studado kaj praktiko de la lingvo ». Artaj laboroj estos okazo por la interesatoj iniciiĝi aŭ praktiki foton, dancon, ktp. kaj samtempe praktiki la lingvon. Paralele okazos kurso por komencantoj kaj praktikado de la lingvo en grupoj.

FONDUSO FOTOKOPIILO

(la listo)

Gesroj Rapley	412 frs
Gesroj Martinez	30 frs
F-ino Leclerc	40 frs
Sume :	482 frs

NOS PEINES

Nous avons appris le décès accidentel, l'été dernier, du fils de notre peranto en Grande-Bretagne, Kenneth Mc Lennan, qui est aussi un grand ami de Grésillon depuis de nombreuses années. Les responsables de Grésillon et tous leurs amis présentent leurs sincères condoléances à M. et à Mme Mc Lennan.

●

Nous avons également appris le décès du père d'un autre grand ami et collaborateur de Grésillon, André Ribot. Toute notre sympathie à M. et Mme Ribot.

●

C'est avec consternation et une très grande tristesse que nous avons appris le décès brutal de M. Gaston Turin, bien connu dans tous les milieux espérantistes. Son activité au sein de I.L.E.I. (ligue internationale des enseignants espérantistes) a permis un développement important de cette association. Les enseignants espérantistes doivent beaucoup à Gaston Turin. Grésillon avait également l'honneur de le compter parmi ses amis et collaborateurs les plus efficaces.

Les responsables de Grésillon tiennent à exprimer à Mme Turin leur peine profonde et leurs condoléances les plus sincères.

POUR AIDER LA MAISON CULTURELLE VENEZ GROSSIR LE NOMBRE DES SOCIETAIRES OU PRENEZ DE NOUVELLES PARTS

Part de sociétaire : 100,00 francs

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

C.C.P. : Nantes 1485 39 P

(ou chèque bancaire)

MAISON CULTURELLE ESPÉRANTISTE
Château de Grésillon - 49150 BAUGE

C.C.P. Nantes 1485 39 P
Téléphone :
- pendant les stages : **(41) 89-10-34**
- hors des stages : **(40) 76-77-95**

Programme 1979

CONFERENCES

du lundi 2 juillet au samedi 21 juillet

— Trois cycles de conférences.
— Discussions.
— Etude et pratique de la langue.
— Atelier de théâtre.
— Excursions.

COURS

du lundi 23 juillet au samedi 11 août

— Cours pour débutants (méthode active - directe).
— Pratique de la langue en groupes.
— Ateliers divers (traduction, étude d'une œuvre, grammaire, théâtre, etc...).
— Excursions.
— Travaux manuels.

ACTIVITES MANUELLES ET ARTISTIQUES

du lundi 13 août au samedi 1er septembre

— Photographie (prise de vue, développement, montage, etc...).
— Danses folkloriques.
— Activités manuelles.
— Etude et pratique de la langue.
— Excursions.

N.B. — Des sessions d'examens auront lieu. Mais les cours donnés à Grésillon ne préparent pas spécialement à ces examens. Sauf pour les débutants, ils n'ont pour but que de parfaire et préciser des connaissances antérieures.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon, noir	:	0,80
couleur	:	1,00
Cuillères de collection	:	15,00
Pendentifs	:	15,00
Pendentifs grosse étoile	:	25,00
Coupe-papier	:	25,00
Disques de stationnement	:	5,00
Etoiles pour vitres de voitures	:	3,00

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de **P. Babin**
Prix : **18,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

LA PLENA ILUSTRITA VORTARO

Un outil indispensable pour apprendre et pratiquer la langue internationnale